# Mallonga Trajnvojaĝo



*Kaj naŭ aliaj noveletoj*

Filip van Laenen

# Mallonga Trajnvojaĝo

## Kaj naŭ aliaj noveletoj

Filip van Laenen

This book is for sale at http://leanpub.com/mallongatrajnvojagxo

This version was published on 2016-01-02

This is a Leanpub book. Leanpub empowers authors and publishers with the Lean Publishing process. Lean Publishing is the act of publishing an in-progress ebook using lightweight tools and many iterations to get reader feedback, pivot until you have the right book and build traction once you do.

© 2015 - 2016 Filip van Laenen

# Enhavo


**Dankvorto** . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . i

**Mallonga Trajnvojaĝo** . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 1

**Ŝtormo** . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 4

**Bildoj** . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 7

# Dankvorto

# Mallonga Trajnvojaĝo

— Ĉu mi ne konas vin? li demandis.

Diable, li pensas, ni ja ne estas en iu vespera kafejo, sed la matena trajno al laborejo. Kion ŝi devas pensi pri mi?

Li ne kutimas paroleti kun stranguloj, kaj certe ne strangulinoj. Eĉ ne en vesperaj kafejoj. Sed estas io fascine konata pri ŝi, kaj li ne scias kion. Certe, ŝi estas bela, sed tamen ne kiel iu filmstelulino. Diru ke ŝi estas «modeste» bela. Eleganta. Alloga.

Evidente ŝi havas bonajn genojn, sed videblas ke ŝi ankaŭ zorgas bone pri si. Ke ŝi manĝas sane, ne tro multe, kaj trejniĝas. Ŝi verŝajne kuras ofte, kaj multe. Sed li ne havas ideon kiom da jaroj ŝi povus havi. Ŝi aspektas kiel dudek-kvinjarulino. Sed nuntempe, ĉiu aspektas havi dudek kvin jarojn, danke al la junigaj medikamentoj. Nur kelkaj povruloj, por kiuj la junigaj medikamentoj ial ne funkcias, ankoraŭ maljuniĝas. Do fakte ŝi eĉ povus esti pli maljuna ol li!

Ĉu ŝi povus esti iu eksa amatino? Ne, li memorus. Ŝi ne ŝajnas tiom konata al li. Kaj ŝajnas al li ke li ne estas tia viro laŭ ŝia emo.

Li ne vidas iun geedziĝan ringon ĉe ŝi. Sed eble ŝi nur havas koramikon?

Kian viron ŝi preferus? Verŝajne iun pli-malpli similan al ŝi. Li divenas ke ŝi havas iun oficejan profesion. Kuracistino, aŭ ekonomiistino, aŭ io simila, li pensas. Aŭ eble ĉefino de iu sekcio en iu firmao.

— Ne, mi pensas ke ne. Mi transloĝiĝis ĉi tien antaŭ semajno.

Kompreneble.

Li prenas la saman trajnon ĉiun matenon, kaj tial konas preskaŭ ĉiun en la trajno. Tie sidas la viro kiu ege aspektas kiel oficisto. Li

ne scias kial, estas simple io pri la vestoj de la viro. Apud li sidas la knabino, kiu videble ne ŝatas ekstari frue matene. Ŝi ĉiam ŝajnas havi malbonan humoron. Aŭ eble ŝi simple ne ŝatas sian laboron. Kaj tie staras la du gefratoj kiuj iris al iu lernejo en la centro de la urbo. Ili babilegas ĉiun matenon, kvazaŭ ili ne vidus sin la lastan tri jarojn. Do jes, li scias ke ŝi estas «novulino» en la matena trajno.

Ŝi ridetas iomete. Do ŝi almenaŭ estas ĝentila persono. Bone. Kaj feliĉe. Ĉar li embarasiĝas. Kion pensas la aliaj en la trajno pri li kaj lia demando al ŝi? Kaj kion pensas ŝi?

Ne certas ke la aliaj en la trajno pensas multe pri la parolado. Ili verŝajne eĉ ne aŭdis la demandon, kaj preskaŭ certe ne aŭskultis. Certe ne la gefratoj, ĉar ili ja estas tro okupataj pri sia propra babilado. Kaj la aliaj legas iun gazeton aŭ aŭskultas muzikon.

Oni ne kutimas paroli kun nekonatoj en lia matena trajno. Estas verŝajne simple tro frue en la mateno, ĉar en la vespera trajno, okazas de tempo al tempo ke kelkaj nekonatoj komencas babili inter si. Li tamen devas konfesi ke plej ofte ili babilas nur pri la vetero aŭ iu alia banalaĵo. Sed estas almenaŭ jam pli bone ol la kompleta silento de la matena trajno.

Ankaŭ li kulpas pri la matena silento. Li ŝatas legi la gazeton kaj kelkajn ĵurnalojn en la matena trajno. Ankaŭ ŝi legas ion, sed li ne povas vidi ĉu ŝi legas iun gazeton, libron, aŭ iujn laborajn dokumentojn.

— Ho, pardonu min. Eble vi nur similas al iu amikino aŭ parencino.

Certe li ne estas la unua viro kiu demandas al ŝi ĉu li konas ŝin.

Estas nur ke li ne demandis tion ĉar li volis flirti kun ŝi, sed ĉar li vere havas senton ke li konas ŝin. Vere, li metis sin en embarasan situacion.

Feliĉe la trajno jam proksimiĝas al la venonta trajnhaltejo. Li laboras en la centro de la urbo, do per trajno daŭras malpli ol duona horo de lia hejmo al lia laborejo. Estas nelonga vojaĝo, sed, kiel

li povas konstati ĉi tiun matenon, tamen sufiĉe longa por fari iun stultaĵon.

Ĉu ankaŭ ŝi eliros ĉe la jena haltejo? Li ne memoras kiam ŝi eniris en la trajnon. Fakte, li eĉ ne memoras ĉu ŝi jam estis en la trajno kiam li eniris, aŭ ĉu ŝi eniris post li. Verŝajne ŝi jam estis en la trajno, ĉar li memorus ŝian eniron, li pensas.

Li ne scias ĉu li diru «ĝis revido» al ŝi aŭ ne, kiam li eliros. Kion fari? Verŝajne estas plej bone ke li diras nenion. Jam sufiĉas por unu mateno.

Kiam li ekstaras, ŝi rigardas lin denove. Ŝi ridetas ĝentile al li. Aŭ fakte amike, ŝajnas al li. Li dubas, sed denove decidas silenti. Kaj simple ridetas reen. Eble li tamen devus diri «ĝis revido», sed nun jam estas tro malfrue.

Sed li rimarkis ŝian rideton. Ĝin li memoras de ie. Ĉu ne ankaŭ lia unua nepino ridetis tiel? Bedaŭrinde, la junigaj medikamentoj ne funkciis por ŝi, kaj ŝi forpasis antaŭlonge. Li memoras ke estis ĉiam konfuze por li, kiam li renkontiĝis kun ŝi: ŝi ja aspektis kiel lia avino, tamen estis li kiu estis ŝia avo.

Kiam li eliras, frapas lin la ekpenso: ĉu ŝi povus esti iu lia pranepino?

# Ŝtormo

Ŝi vekiĝis kaj ellitiĝis. Ŝi dormis bone ĉi tiun nokton, sed ŝi ja ĉiam dormas bone ĉi tie. Pli bone ol hejme. Estas iomete mirinde, sed ŝi havas sian eksplikon pri tio: la tagoj estas iomete pli longaj ĉi tie, kaj tial, ŝi ankaŭ estas iomete pli laca kiam ŝi enlitiĝas.

Irante tra la koridoro ŝi jam flaras la matenmanĝon. Ne estas iu neordinara matenmanĝo, sed iel – kaj ŝi vere ne scias kiel – la kuiristo ĉiam scipovas zorgi ke la matenmanĝo estas tre bonodora kaj bongusta. Aŭ ĉu la matenmanĝo ĉi tie simple odoras kaj gustas pli bone ĉar ŝi dormas pli bone, kaj tial ŝi ankaŭ malsatas pli multe matene?

Ŝia kolego Ĝeraldo jam estas en la manĝejo. Ŝi ne tre ŝatas lin, tamen ankaŭ ne malŝatas lin. Ili simple estas kolegoj. Sed ŝi preferus ke ŝi povus esti ne nur kolegoj, sed ankaŭ amikoj kun ĉiu ĉi tie. Ne estas problemo kun la aliaj kolegoj: ŝi amikas kun ili, kaj ili kun ŝi. Estas nur io pri Ĝeraldo. Ankaŭ la aliaj ne tre ŝatas lin, kaj ne amikas kun li. Feliĉe tio ne ĝenas lin. Aŭ almenaŭ ŝajnas al ili ke tio ne ĝenas lin. Verŝajne li simple estas iomete solema.

Nur Ĝeraldo estas en la manĝejo. Do la aliaj ankoraŭ dormas, aŭ almenaŭ ankoraŭ ne ellitiĝis. Estas domaĝe, ĉar Ĝeraldo ne estas tre parolema, kaj ŝi ŝatas babili iomete dum manĝado. Sed ne gravas.

— Ĉu vi jam aŭdis la novaĵon? demandas Ĝeraldo. Venos nova ŝtormo. Ni devas fiks(ig)i ĉion antaŭ tagmezo.

Nova ŝtormo. Ŝi vere malŝatas la ŝtormojn ĉi tie. Lastfoje la ŝtormo daŭris pli ol tri tagojn, kaj ĝi estis tiel forta ke ili eĉ timis ke ĝi detruos ion. Feliĉe ĝi ne faris tion, sed jam estas sufiĉe terure ke ili ne povis komuniki kun Tero dum tri tagoj.

Ordinare la komunikado kun Tero jam estas sufiĉe malfacila. Radio-signaloj bezonas de 3 ĝis 21 minutoj por travojaĝi la distancon inter

Tero kaj Marso, depende de ilia relativa pozicio en la sunsistemo. Tio signifas ke oni nur povas sendi mesaĝojn, ne vere komuniki. En la plej malbona okazo, oni ja devas atendi la respondon pli ol 42 minutojn! Babili kun amikoj aŭ familianoj, aŭ eĉ diskuti ion teĥnikan kun la ĉefa stacio sur Tero simple ne eblas. Sed almenaŭ oni povas komuniki. Dum ŝtormo, eĉ la simpla komunikado ne eblas dum multaj tagoj. Jam okazis unufoje ke la ŝtormo daŭris kelkajn semajnojn, sed feliĉe tiam oni tamen povis komuniki iam kaj tiam dum la ŝtormo.

Ili venis al Marso antaŭ du jaroj. Ili estis la unuaj, kaj ĝis nun la solaj. Ne certas ke ili iam revojaĝos reen al Tero. Ili ne havas la ilojn nun, ĉar ne estis sufiĉe da spaco en ilia raketo. Sed ŝi esperas ke post kelkaj jaroj, venos pliaj al Marso, kaj tiam certe kreskos la ŝancoj por vojaĝi reen al Tero. Se la trafiko inter Marso kaj Tero restos unudirekta, la kolonigado de Marso ne estos vera sukceso por la homaro. Ŝi nur ne scias ĉu ankaŭ ŝi iam povos profiti de tiu vera sukceso – se ŝi iam volos.

Kaj ilia misio jam havis malgrandan malsukceson. Kiam ili forvojaĝis de la Tero, ili estis ok, sed unu kolego, Alberto, forpasis nelonge post kiam ili alvenis al Marso. Li ricevis kanceron, kaj ili ne povis alsendi la ĝustajn medikamentojn al li sufiĉe rapide. Ili eĉ ne provis, ĉar ili sciis ke ne indas.

Ŝi sentis sin tre senpova dum la malsaneco de sia kolego. Ŝi ja estas i.a. la stacia kuracistino, kaj ne povas helpi lin multe kaŭze de la manko de medikamentoj. Feliĉe ŝi povis sendolorigi lin dum la malsanado. Estis almenaŭ iometo, sed la periodo estis tamen tre frustra por ŝi.

— Ĉu la ŝtormo estos forta? ŝi demandas.

— Fakte jes, pli forta ol la lasta, Ĝeraldo respondas. Kaj ĝi verŝajne daŭros kvar aŭ kvin tagojn.

— Terure, ŝi diras.

Ĝeraldo nur ŝultrumas. Komunikado ne estas lia fako, kaj videblas

ke li ankaŭ ne zorgas multe pro nekomunikado. Por ŝi la novaĵo tamen detruetas la komencon de la tago.

Ŝi komencas matenmanĝî. Ĝeraldo legas iun gazeton, kaj ŝi trarigardas siajn mesaĝojn. Kaj la meteologian raporton, kompreneble.

— Raĥelo, venu! Kie vi estas? iu krias tra la koridoro.

Ŝi kaj Ĝeraldo tuj haltas matenmanĝi. Ne ofte okazas ke iu krias tra la koridoro, do certe gravas. Kaj ŝi povas aŭdi iom da paniko en la voĉo. Ŝi kaj Ĝeraldo hastas en la koridoron.

— Kio okazas? ŝi respondas.

Ili trafas Marion en la koridoro. Ŝi aspektis ŝokita. Certe estas io nebona.

— Estas Ignaco! Li ege malsanas!

Kune ili iras al la ĉambro de Ignaco, kaj eniras. Li aspektas tre pala, kaj tusas. Kaj ĉu li ankaŭ sangas iomete de siaj nazo kaj buŝo?

Ŝi rigardas al Mario. Kaj Mario al ŝi.

— Ĉu ne ankaŭ…? flustras Mario.

Jes, ŝi komprenas kion Mario volas diri, sed ne kuraĝis. Kaj jes, Mario pravas. Estas la samaj simptomoj kiujn havis ilia kolego Alberto en la komenco. Sed kiel eblas? Kaj kial? Ĉu signifas ke Alberto ne nur malbonŝancis?

Ŝi devas rapidege sendi mesaĝon al la bazstacio, antaŭ ol la ŝtormo venos. Eble ŝi eĉ ricevos iun respondon antaŭ la veno de la ŝtormo. Sed ĉu ili povos helpi Ignacon pli bone ol Alberton?

# Bildoj

- **Cover image**: IMG_2244 (bildo pri Maglev trajno en Shanghai) per Joriz De Guzman sur Flickr
  - https://www.flickr.com/photos/jorizdg/6095483628/